

**NSiR - Nova Sento in Rete
N. 1112 (39/2021)**

Aperiodico della Federazione Esperantista Italiana

Federazione Esperantista Italiana: posta fei@esperanto.it ; internet
<http://www.esperanto.it>

Itala Esperantista Junularo: posta iej@esperanto.it ; internet
<http://iej.esperanto.it>

Via Villoresi, 38 IT-20143 Milano Tel 02 58100857

Mandate i vostri contributi a: Norberto Saletti, notiziario@esperanto.it
indicando nell'oggetto "Per Nova Sento in Rete"

NON RISPONDETE AL MESSAGGIO CON CUI ARRIVA NSiR

I messaggi che arrivano al sistema non vengono gestiti.

Le lettere non firmate non saranno pubblicate.

Tutto il materiale distribuito da NSiR è riproducibile citandone la fonte.

ISCRIVETEVI ALLA FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA

<http://www.esperanto.it/iscrizione-fei.htm>

LIBRERIA

<http://www.esperanto.it/libri.htm>

feilibri@esperanto.it

INCONTRI ESPERANTISTI IN ITALIA

Il Congresso Nazionale: <http://kongreso.esperanto.it>

Il Festival Giovanile di Pasqua: <http://iej.esperanto.it/ijf>

IL 5 PER MILLE ALLA FEI

Indicate il codice fiscale **80095770014** nella vostra dichiarazione dei redditi,
realizzeremo grandi progetti!

Indice articoli

- Marcia della Pace: noi c'eravamo	2
- TEJO atingis konsultan statuson ĉe UN	3
- Esami a Pisa.....	5
- Baltiaj Esperanto-Tagoj 2022	5
- RAI!	6
- Breŝa Grupo rekunvenas.....	7
- Calendarietti	7
- Biblioteca di Frascati	7
- Addio, Carlo Geloso.....	7
- Eh, tio ne okazus, se oni uzus esperanton.....	8


MARCIA DELLA PACE: NOI C'ERAVAMO

Come documentato da un video del Movimento nonviolento, gli esperantisti hanno partecipato alla Marcia della pace sin dal suo inizio, nel 1961. Siamo quindi lieti di continuare questa partecipazione anche a nome di tanti che non hanno potuto partecipare e di quelli che ci hanno preceduto. Il Movimento esperantista è tuttora portatore di valori di fraternità, solidarietà e fratellanza che si concretizzano in rapporti umani che si realizzano nelle nostre relazioni quotidiane con persone di ogni etnia, religione e cultura attraverso l'uso costante della lingua esperanto, uso che vuole rappresentare un modo possibile di intraprendere relazioni umane su una base di uguaglianza e parità.

Ci ha fatto molto piacere rispondere alle molte domande di curiosità sulla lingua esperanto da parte dei partecipanti alla Marcia e rappresentare un'utopia possibile che oggi cammina sulle nostre gambe.

Un caro saluto e ringraziamento a tutti gli organizzatori della Marcia

(Dal messaggio alla Tavola della Pace da parte di Andrea Montagner)





TEJO ATINGIS KONSULTAN STATUSON ĈE UN

TEJO atingis gravan sukceson en siaj rilatoj kun internaciaj organizaĵoj. La junulara sekcio de UEA nun havas specialan konsultan statuson kun Unuiĝintaj Nacioj, kio permesas al ĝi propranome interveni en diskutoj kaj fari proponojn en diversaj UN-organoj.

UEA ricevis aŭtomate konsultajn rilatojn kun UN jam en 1954, rezulte de la similaj rilatoj atingitaj kun Unesko. Tamen, UEA tiam apenaŭ atentis pri tiu statuso en siaj eldonaĵoj, krom fojaj mencioj en estraraj jarraportoj.

Tiurilate okazis ŝanĝo en 1985, kiam la rilatoj kun UN estis promociitaj el la plej suba kategorio C al A. Tiun statuson de "veraj" konsultaj rilatoj povis ricevi neregistaraj organizaĵoj pro propraj meritoj anstataŭ aŭtomate pro ligo kun iu speciala UN-organizaĵo.

Fine de la 1990-aj jaroj okazis organizaj ŝanĝoj ĉe UN, kaj la statuso de UEA estis ŝanĝita al tiel nomata "listigita neregistara organizaĵo". Tiam UEA preparis ampleksan dokumentaron pri sia agado ĉe UN por atingi la novan "specialan konsultan statuson". Tio sukcese okazis en 1998.

Nun similan statuson ekhavis ankaŭ TEJO. Ni petis la respondecan estraranon Valentin Ceretto Bergerat rakonti, kiel oni laboris por atingi tion.

***Libera Folio*: Kiel TEJO laboris por atingi tiun sukceson?**

– La afero fakte komenciĝis ankaŭ kelkaj jaroj, sekve de la statusa memstarecigo de TEJO en 2017. Nia tiama oficistoj pri Eksteraj Rilatoj Quentin Weber-Seban komencis la laboron, apogite de pluraj aktivuloj, kun gravaj kontribuoj de interalie Francesco Maurelli. La akredita proceso estas longa kaj estis poste sekvita de Spyros Papadatos, nia nuntempa oficisto pri eksteraj rilatoj. – Multaj ĝisnunaj agadoj de TEJO kontribuis al la sukcesa kandidatiĝo, kiel flankaj eventoj organizitaj paralele de forumoj, la alparoladoj. La kandidatiĝo fakte estis dokumento kiu interalie listigas la agadojn kiujn TEJO faris ĉe UN. Tiu longdaŭra aktivado de TEJO jam en la UN-sfero delonge okazas dank'al UEA. Tiu havas fame longdaŭran historion kun UN. La asocio ekhavis konsultajn rilatojn kun Unesko en 1954. – TEJO, kiel junulara sekcio de UEA, ne havis ĝis 2017 la juran personecon por memstara reprezentado kaj povis agi nur pere de UEA, kio ne estis problemo en si mem, konsiderante ke UEA plene kunlaboremas pri tio. Tiel plurfoje okazis ke TEJO-membroj estis inkluditaj en UEA-delegitaroj. Unu el la plej famaj ekzemploj estas la alparolo de Rakoen Maertens, nia ĉefreprezentanto ĉe UN kaj Unesko, en la Ĝenerala Konferenco de Unesko en novembro 2017. En aprilo 2019, Rakoen sammaniere alparolos okaze de la Junulara Forumo de EKOSOK.

Kion la nova statuso signifas en la praktiko?

– Unue, tio signifos ke ekde nun TEJO rajtas je reprezentantoj, delegitaroj kaj kontribuoj al komunaj pozicioj dum UN-eventoj, apartaj de tiuj de UEA. Nia statuso kiel oficiala partnero de UN ankaŭ faciligos nian kunlaboradon kun landaj delegitaroj kaj diplomatoj. – TEJO ankaŭ povos rekte rilati kun UN-instancoj sen UEA-perado, ekzemple pri ĝuste delegitaroj aŭ pri partopreno en UN-eventoj, kio iusence malpezigos la laboron de UEA. – Ĉefe, tio signifos ke Esperanto kaj Esperantujo estos reprezentitaj de plia organizo ene de la UN-sistemo, kio plividebligos niajn lingvon, komunumon kaj lingvorajtajn temojn. Tamen tio ne signifas apartigon de UEA, ĉar ja gravas prezenti unuecan bildon de nia movado al la ekstera publiko.

Kiel TEJO praktike utiligos la sukceson?

– Unue, ni planas plifortigi nian teamon en la kernaj UN-urboj (Vieno, Ĝenevo, Novjorko) kaj trejni novajn homojn. Ni tiel daŭrigos nian ĉeeston en la kutimaj UN-eventoj, kiel la EKOSOK Junulara Forumo, ĉu persone aŭ rete. – La agado de TEJO tiutere estas konsciigi pri la graveco de lingvaj rajtoj kaj prezenti Esperanton kiel solvon al internacia komunikado. Tion ni ekzemple faris dum la antaŭa estrara mandato, kiam ni dufoje organizis retajn eventojn okaze de du retaj UN-forumoj partnere kun UEA.

– En tiu ĉi jaro, ni substrekis la gravecon de lingvaj rajtoj en pandemia situacio, helpe de la interveno de pluraj esploristoj pri la temo. Nia plua strategio estas starigi Lingvan Aliancon por faciligi kunlaboradon en lingvo-rilataj temoj inter la NRO-oj aktivaj ĉe UN.– Intertempe, ni gvatas baldaŭajn (retajn) eventojn kaj uzas la tempon por varbi kaj trejni novajn aktivulojn al nia Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER), kiu zorgas pri la rilatoj inter TEJO kaj aliaj organizoj. Pri tio UEA-aktivuloj aktive helpis nin kaj mi intencas daŭrigi la kunlaboradon inter la reprezentantoj de ambaŭ organizoj.– Mi ŝatus finfine gratuli kaj danki la longjaran laboradon de niaj aktivuloj kaj oficistoj por plenumi tiun atingon, pri kio mi persone apenaŭ kontribuis per mia ĝisnuna mallonga aktivado en TEJO!

ESAMI A PISA

Il giorno 17 ottobre 2017 hanno brillantemente superato l'esame di primo grado presso la Cattedra di Pisa i seguenti candidati:

- CARLO NICOLA COLACINO di Pisa
- ANTONIO GHU di Pisa
- PATRIZIA BINI di Firenze.

Complimenti da tutto l'IIE.!

Laura Brazzabeni
Direttore generale IIE

BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ 2022

Post dujara deviga pandemia paŭzo la 56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj denove reale kaj fizike okazos en Litovio la 9-17-an de Julio, 2022, ĉi-foje en Litovia havenurbo Klaipėda apud Balta maro, en la universitato de Klaipėda. Litova Esperanto-Asocio invitas Vin ĉiujn partopreni kaj partoprenigi aliajn. La aranĝo estas dediĉata la la 770-jariĝo de Klaipėda kaj al la 135-jariĝo de Esperanto. BET-56 havas auspicion de la Universala Esperanto-Asocio. Alta Protektanto de BET-56 estas la urbestro de Klaipėda Vytautas GRUBLIAUSKAS.

Detalaj informoj pri la aranĝo estas en Informa bulteno pri BET-56 ĉi-tie: <https://sezonoj.ru/2021/08/bet-99/>. Reta aliĝilo al BET-56 estas trovebla ĉi-tie: <https://mallonge.net/gl>

BET-56 havas ĉiuflankan subtenon kaj helpon de urbaj instancoj de Klaipėda kaj ankaŭ de la tutlandaj ŝtataj instancoj de Litovio. Partoprenantoj de BET-56 havos luksajn kondiĉojn por laboro kaj ripozo. BET-56 estos vere altnivela internacia esperantista aranĝo kaj programe kaj organize. La programo kiel kutime dum BET-oj estos tre varia kaj interesa.

Organizantoj de BET-56 tre akurate zorgos pri ĉiuj sanprotektaj aferoj por eviti pandemiajn danĝerojn. Ni atendas ne malpli ol 500 partoprenantojn el 30-40 landoj. Litovaj esperantistoj faros ĉion eblan por kontentigi ĉies dezirojn kaj gustojn. Konstante aktualigataj ĉiuspecaj informoj pri BET-56 estas en ties retejo :<http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56>

Aparta rubriko pri BET-56 estas ankaŭ en la novajhretejo La Ondo de Esperanto, kie estas akumulataj ĉiuj gravaj informoj pri la aranĝo:<https://sezonoj.ru/bet/>

Ĉiujn aktualajn informojn pri BET-56 liveras ankaŭ la Eventa Servo:<https://eventaservo.org/e/BET-56>.

Listo de jamaj aliĝintoj al BET-56 estas ĉi-tie: http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=BET56&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select_arrange=headnum&desc=asc&no=9

Videofilmeto pri Litovio en Esperanto estas spektebla ĉi-tie: http://www.esperanto.lt/board/view.php?id=BET56&page=1&sn1=&divpage=1&sn=off&ss=on&sc=on&select_arrange=headnum&desc=asc&no=5

Bonvolu plani Vian partoprenon en tiu-ĉi grava internacia esperantista aranĝo kaj disvastigi informojn pri sekvontjara BET-56 tra diversaj internaciaj kaj Vialandaj naciaj esperantistaj informkanaloj. Informa bulteno pri BET-56, elŝutebla aliĝilo kaj emblemo de la aranĝo estas ankaŭ alkroĉitaj.

Esperante, ke Vi kaj multaj aliaj esperantistoj partoprenos

Povilas JEGOROVAS, Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio kaj de la Organiza komitato de BET-56

pjedorovas@yahoo.com

RAI!

Venerdì 5 novembre alle ore 23.50 su RAI - RADIO 1 andrà in onda la trasmissione radiofonica sulle città gemelle: hanno partecipato Luigi Fraccaroli, presidente FEI e motore del gemellaggio Brescia – Darmstadt, Debora Rossetti segretaria gruppo di Roma e motore del gemellaggio Parigi-Roma, e Marc Giraud, presidente del gruppo parigino e coordinatore degli incontri delle due città gemelle: Parigi e Roma, con altre asiatiche.

Lunedì 15 novembre alle ore 10.25 su RAI 3 andrà in onda la trasmissione televisiva dedicata al congresso di Assisi, in particolare l'omaggio al padre della lingua italiana, Dante Alighieri, ed al padre della lingua esperanto, Ludwig Zamenhof.

Hanno partecipato:

con contributo registrato in Assisi Giuliano Turone;

con contributo registrato in Assisi Chiara Raggi e Mario Migliucci;

in collegamento *skype* Mario Migliucci;
in presenza in studio Michela Lipari.

BREŜA GRUPO REKUNVENAS

Bonetosa vivĝuplena vesper(manĝ)o ĉe la tradicia renkontiĝpicejo komencis la novan sezonon de Breŝa Esperanto-Grupo, kies 18 partoprenantoj –el kiuj ses malpli ol 30-jaraĝaj– babilis kaj diskutis variteme sabaton la 16-a de oktobro 2021.

Planitas laborkunveno priKongresa komence de novembro.

CALENDARIETTI

Finalmente possiamo comprare i calendarietti-segnalibri per il 2022!

100 copie 5 euro+spese di spedizione **€ 2,50.**

per prenotazioni feilibri@esperanto.it o una telefonata in segreteria.

BIBLIOTECA DI FRASCATI

Il Gruppo Esperantista Tuscolano, ispirandosi al piano nazionale di ripresa e resilienza, si è accordato con la Biblioteca di Frascati per ricominciare a breve i suoi corsi in presenza. Se conoscete qualcuno in zona che voglia riprendersi e resilire/rimbalzare con l'esperanto, chiedete informazioni ad Alina Santilli, alina.santilli@outlook.it, Presidente del Gruppo.

ADDIO, CARLO GELOSO

Il Gruppo Esperantista Torinese, attivo in Città ininterrottamente dal 1912, ha beneficiato per molti decenni dell'assidua presenza di una persona unica nel suo genere. Carlo Geloso, già al primo sguardo, conquistava simpatia e interesse, ma anche soggezione: era, come si usa dire, "una bella persona", non solo per la schiettezza del viso e per l'impatto del suo portamento, ma soprattutto per la sua prorompente carica umana, sorretta da un bagaglio culturale, a dir poco insolito (storia, letteratura, musica, arti figurative e grafica), e sostenuta da una memoria prodigiosa.


Carlo si interessava attivamente dei soci anziani e malati, visitandoli e occupandosi di loro. L'aspetto più singolare della sua generosità consisteva nel versificare all'impronta gaie composizioni in occasione delle ricorrenze festive dei suoi interlocutori. Ricorrendo, a seconda dei casi, ora al piemontese, ora all'italiano, ora all'esperanto. In questi tre idiomi Carlo Geloso fondava, da una parte, il suo radicamento subalpino; dall'altra, la sua identità culturale di

cittadino italiano, e infine, l'appassionata adesione all'ideale, in parte già realizzato, di un mondo in cui una comune lingua non etnica facilita il superamento delle incomprensioni accumulate tra i popoli. Carlo Geloso ha interpretato meglio di altri l'ideale culturale dell'essere anche un esperantista.

Fabrizio A. Pennacchietti

Professore Emerito dell'Università di Torino

EH, TIO NE OKAZUS, SE ONI UZUS ESPERANTON!



Ci sono parecchie versioni sull'origine del nome di questo delizioso piatto, e il riferimento alle prostitute non è unanimemente accettato. Qui, invece, ci sono andati giù diretti, oltre ad aver sostituito una "p" con una "o". L'usanza sarebbe quella di lasciare il nome originale, tra virgolette. Secondo Wikipedia, il nome originale sarebbe addirittura "alla marinara", o, come dicono a Napoli, "olive e capperi".